



Novjorka Prismo

Numero 144

Majo 2005

La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia maja kunveno

DATO: Vendredon, la 20-an de majo 2005, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Komuna Kantado de Esperant-lingvaj Kantoj (Jon Liechty)
– Diskuto pri ARE 2005 ĉe Silver Bay (Arnold Victor)
– Elekto de lokoj por someraj renkontiĝoj (Stuart Green). ★

Protokolo de la kunveno de la 15-a de aprilo 2005

Je la sepa horo kaj duono, Stuart GREEN oficiale malfermis la kunvenon, kaj bonvenigis ĉiujn ĉeestantojn. Li memorigis nin pri la pago de kotizoj. Li petis, ke ĉiu nepaginto sendu sian pagon al Sonja SOSKINA kun la verda slipo enkovertigita kun *Prismo*. Ĉeestis entute ok personoj ĉe la kunveno.

La protokolo de la marta kunveno estis akceptata. Rochelle F. GROSSMAN demandis, kie la *Prisma* foto de la novjorka EANA-kunveno estis fotografita. Tomaso ECCARDT proponis, ke eble la loko estis la YMCA ĉe 23-a strato.

Post ŝerco de Stuart sekvis kelkaj anoncoj. Tomaso anoncis, ke lia kurso rekomenciĝos lundon la 18-an de aprilo je la 6-a horo kaj duono en la restoracio Emma's Dilemma (270 Park-Avenue Suda, apud orienta 21-a strato). Tio estos tute nova kurso kun nova grupo de studentoj. Pilar RAU diris, ke ŝi konas kelkajn el la novaj kursanoj. Unu el ili estas ŝia studanto en ŝia kurso de antropologio ĉe New York University.

Stuart poste petis ideojn pri prelegoj por venontaj kunvenoj, kaj proponojn pri la loko de la somera pikniko. Tiuj kun ideoj estis invitataj paroli kun li kaj la program-direktorino Maki SANO.

Sekvis la ĉefa parto de la kunveno. La grpanoj interrakontis amuzajn ŝercojn, kaj ludis distran kartludon, kiu konsistis el legado de strangaj demandoj kaj respondoj. Fine, ni spektis la filmon de Pilar pri la Zamenhofa festo de antaŭa decembro. Pilar disdonis videodiskojn de la filmo al la ĉeestantoj.

Kelkajn minutojn post la 9-a horo Stuart oficiale fermis la kunvenon. ★

Protokolis:
Jeff BLAKESLEE

“Fordono” de kulturo

2 aprilo 2005. Subiris la suno je 6:22, kaj dekoj da artistoj venis iom post iom al la Projektejo (Project Room) en la Malsupra Orienta Flanko de Novjorko, por oferi sian talenton al komuna nokto de interŝanĝo. La programo de la renkontiĝo ne finiĝis ĝis la reapero de la suno ĉ. 6:30. Tiuj 12 horoj da mallumo vidis muzikon de la plej diversaj specoj kaj instrumentoj, projekciadon de fruaj silentaj filmoj kaj instrufilmoj pri naturo, la praktikon de la japana kuracarto reikio en ŝirmita angulo, kaj ame preparitajn veganajn manĝaĵojn. La evento estis internacia en pluraj rilatoj: la afiŝoj estis skribitaj en kvar lingvoj (la angla, hispana, franca, kaj Esperanto), oni deklamis poemojn en la hispana, kaj kantis en la persa, itala, kaj Esperanto. Ankaŭ la spektantoj, el kiuj pluraj aktive kunrolis, ŝatis ĉi tiun interesan eksperimenton. ★

– Thomas MORGAN

Maja IBM Plaza

Je internacia labortago, la 1-an de majo, pli malpli dek ESNY-anoj kunvenis ĉe IBM Plaza por babili kaj manĝeti. Ni diskutis plurajn gravajn aferojn, inkluzive la venontan ARE ĉe Silver Bay kaj Lago Georgo, Novjorkio. ★

– Tom ECCARDT

Niĵ revenos

Nia samideano Niĵ Blonstein revenos de Brazilo al Novjorko dum la somero kaj intencas resti en Novjorko dum unu jaro. Bedaŭrinde li ĝis nun ne aranĝis loĝlokon. Do se vi scias pri loĝebleco por Niĵ, aŭ ĉambro aŭ malgranda apartamento, bonvolu kontakti lin ĉe <neil_nachum@yahoo.com>. Dankon! ★

– Jim MEDRANO

Someraj renkontiĝoj

Karaj klubanoj,

Jam estas tempo por diskuti lokojn por la someraj pikniko kaj renkontiĝoj. Dank' al Tom Eccardt, ni havas liston de renkontiĝ-lokoj de pasintaj jaroj. Bonvolu elekti viajn plej ŝatatajn el la listo, aŭ proponi novajn lokojn. Ni diskutu datojn kaj lokojn dum la maja kunveno.

Renkontiĝ-lokoj de pasintaj jaroj: Esperanto Kafejo, Central Park (Zoo, Pinetum, Boathouse, Shakespeare, kaj Statuo de Alico), Bryant Park (ĉe Statuo de Bryant, Filmoj), Unisphere ĉe Flushing Meadows Park, Fort Tryon Park, Riverside Park, Stuyvesant Town Oval, South Street Seaport, Sculpture Garden Concert, United Nations (Tour, Garden), Winter Garden ĉe World Financial Center, Cathedral of St. John the Divine, Circle Line cruise, Staten Island Chinese Garden, Filmoj apud Hudson River, Donnell Library, Sony Plaza, Pikniko ĉe membro (Burwell, Soskina). ★

– Maki SANO



Oficialaĵoj ĉe la maja kunveno

Ĉar la maja kunveno estas la lasta de la printempa sezono, ni kutime faras kelkajn decidojn por la somera kaj la aŭtuna sezonoj. Ni devas decidi pri kie okazos nia somera pikniko kaj devas diskuti pri eblecoj por someraj renkontiĝoj. Krome, oni nomos kandidatigan komitaton, kiu provizos kandidataron por la estraraj postenoj de 2006. Do, bonvolu veni kun viaj proponoj pri renkontiĝoj, kaj volontulu por la komitato se vi deziras! ★

– Tom ECCARDT

Zamenhof en ekzameno

Sube estas demando, kiu aperis en ĉi-jara enir-ekzameno de Tokio Universitato, unu el la plej altnivelaĵoj universitatoj en Japanio. Tiu ĉi angla demando temas pri Zamenhof. Kial ne vi provu? ★

— Maki SANO

Demando

En la suba artikolo pri Esperanto, mankas kelkaj alineoj (paragrafoj). Trovu taŭgan alineon el malsupra listo de alineoj (1~6) por ĉiu manka alineo (A~D). Notu, en la listo ekzistas du falsaj alineoj.

Artikolo

Bialystok in the 1860s was a city torn apart by intolerance and fear. Located in the north-east of what is now Poland, and at the time under Russian rule, the city was home to four main communities: the Poles, the Russians, the Germans, and the Jews. These communities lived separately, had no shared language, and mistrusted each other deeply. Violence was an everyday event.

[Alineo A mankas ĉi tie]

Zamenhof had been brought up by his parents to speak Polish, German, Russian, Yiddish, and Hebrew, and he also had a good knowledge of English and French, so he knew that no existing language would work. For one thing, the fact that all of these languages were associated with a particular country, race, or culture meant that they lacked the neutrality any international language would need in order to be accepted.

[Alineo B mankas ĉi tie]

But inventing languages doesn't pay the bills, so Zamenhof needed a career. He studied medicine and became an eye doctor. By day he took care of people's eyes, and in the evenings he worked on his new language: Esperanto. Esperanto is a beautifully simple language with only 16 basic rules and not a single exception. It is probably the only language in the world to have no irregular verbs (French has more than 2,000, Spanish and German about 700 each) and, with just six verb endings to master, it is estimated that most beginners can begin speaking it after an hour.

[Alineo C mankas ĉi tie]

Although Zamenhof's beautiful language is not associated with any one nation or culture, three-quarters of its root words have been taken from Latin, Greek, and modern European languages. The advantage to this is that about half the world's population is already familiar with much of the vocabulary. For an English speaker, Esperanto is reckoned to be 5 times as easy to learn as Spanish or French, 10 times as easy as Russian, and 20 times as easy as Arabic and Chinese.

[Alineo D mankas ĉi tie]

Listo de alineoj:

1: At the same time, Johann Schleyer, a German minister, was working on his own new language, Volapuk, meaning "World Speech." Schleyer's language first appeared in Germany in 1878, and by 1890 more than 283 Volapuk-speaking associations had been formed. But generally, people found Schleyer's language strange and ugly — and no easier to learn than Latin.

2: These existing languages also had complicated grammatical rules, each rule with its own exceptions, and this meant that they lacked another essential characteristic of a universal second language: they could not be easily learned by ordinary people. The difficulty factor also meant that neither Latin nor classical Greek had much potential as a universal language. Zamenhof was left with only one option: he would have to devise his own.

3: It was here, where lack of understanding created racial hatred, and racial hatred regularly exploded on the streets, that Ludvic Zamenhof was born in 1859. His mother was a language teacher and his father was also a student of languages. By the time he was fifteen, young Ludvic had seen enough violence in his hometown to convince him of the need for a common language that would enable different communities to understand each other.

4: The disadvantage, obviously, is that speakers of non-European languages have to work little harder to get started with Esperanto. But Esperantists argue that the simplicity of Zamenhof's language scheme quickly makes up for any unfamiliarity with its root words. They proudly point to the popularity of Esperanto in Hungary, Finland, Japan, China, and Vietnam as the proof of Zamenhof's achievement in creating a global language for mutual communication and understanding.

5: Esperanto vocabulary is also very simple. Instead of creating a huge list of words to learn, Zamenhof invented a system of very basic root words and simple ways to change their meanings. Putting "mal-" at the start of an Esperanto word, for example, changes that word into its opposite. Esperanto speakers easily make new words by putting two or more existing words together. This kind of word invention is regarded by Esperantists as a creative process which adds to the appeal of the language.

6: The fact that Esperanto is so easy to learn has been the key to its success. Of course, English is even more important as a world language today than it was when Ludvic Zamenhof was alive. But while English may have become even more useful, it hasn't become any easier — and that's why

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Majo 2005

20

ESNY KUNVENO

*Komuna Kantado de
Esperant-lingvaj Kantoj.
(gvidota de Jon Liechty.)
Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT*

Junio

5

Tagmanĝo

*Dimanĉon, 1:00 pm ĉe IBM Plaza
(Limdato por kontribuajoj por Prismo 145)*

SOMERA PIKNIKO

?

Ni elektos daton kaj lokon dum majo

United Federation of Teachers (UFT)

50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

"IBM" Building Atrium (antaŭa nomo)

590 Madison Avenue (56th Street) NYC

Street level, in the Atrium

Esperanto is still so popular. Whatever your native language, you start from the beginning with Esperanto. Not even speakers of European languages have an advantage. Truly, Esperanto is a language that offers everybody, equally, the chance to speak up and be heard in today's world. ★

Letero

(Thank you for) publishing one of my contributions. I saw that you changed poluenzo to the more "fundamenta" poluilo, to which I have no objection. Also, you included my "Subteno fare de Konfuceo," which is rather amusing and, as I now realize, a good idea. Of course, the decreguloj that Confucius was referring to were rather different and had to do with "not doing anything contrary to propriety," but let's look at them as revised to apply to the modern world.

It is not very important, but I noticed that W.F. Solzbacher's name was misspelled. I believe it should have an "o" and not an "a" after the "s," even though "salz" makes more sense, meaning "salt" in German (although a "salt brook" is not too likely). ★

— Cordially, Maurice WITTENBERG



ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Stuart Green
(631) 751-5683

Koresponda Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Jeff Blakeslee
(718) 383-2715

Vicprezidanto
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 813-2495

Program-Direktorino
Maki Sano
(212) 614-9184

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2005 Esperanto Society of New York

Novjorka Prismo

Numero 144 — Majo 2005
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>